

revuo

esperanto

julio/aŭgusto 1967

60-a jaro

n-ro 740-1 (7-8)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



DU KONGRESOJ EN ROTTERDAM
Universala Kongreso kaj IJK de TEJO

ESPERANTO

revuo internacia

enhavo	105 UEA kunmetas allogan kongres-programon
	106 Rotterdam (fotoj)
	107 Enŝipiĝu en Rotterdam por observi kaj partopreni la TEJO-kongreson
	Esperanto-elsendoj de BBC
	108 Rezultoj de la informa laboro dum 1966 (Becker)
	109 Enkonduko en la libroskiencon de Esperanto (2) (Haupenthal)
	111 Recenzoj
	112 Ricevitaj eldonaĵoj
	Nekrologoj Novák, Cousineau, Brunet, Douglas
	113 Mallonge
	114 Esperanto en radio
	Memoriga kalendaro
	115 La Juna Vivo
	La internaciaj konkursoj 1967
	116 Oficiala informilo n-ro 403:
	Elekto de komitatanoj B
kovrila bildo	La nova koncertejo "De Doelen", inaŭgurita en 1966, estos la kongresejo tiel de la 52-a Universala Kongreso kiel ankaŭ de la 23-a IJK de TEJO. La impona kaj eminente taŭga konstruaĵo troviĝas en la koro mem de la urbo Rotterdam. (Foto: Kongres-oficejo Rotterdam)
bildojn liveris	106 (sube maldekstre): Haven-instanco Rotterdam
	(sube dekstre): Publikaj Laboroj Rotterdam
	115 L. Szakácsi

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1967): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld.) Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en ĉ. 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: D-ro H. R. Tonkin, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

Serva Centro, ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

Rotterdam anstataŭ Tel Aviv — tiun decidon oni jam povis legi en la Mesaĝo de la Prezidanto, aldonita al la junia "Esperanto". Intertempe la Estraro de TEJO decidis transigi sian Kongreson el Natanja, Israelo, ankaŭ al Rotterdam. (Pri tio legu sur p. 107.) Ambaŭ kongresoj okazos de merkredo la 2-a ĝis merkredo la 9-a de aŭgusto. En la momento de verkado ni povas nur esperi, ke baldaŭ revenos daŭra paco en Mez-Oriento, tiel ke UEA povos fine okazigi tie Universalan Kongreson en ne tro malproksima estonteco.

Idealaj kondiĉoj en Rotterdam

Plej feliĉa koincido estas, ke en la urbo, kie troviĝas la Centra Oficejo de UEA, ekfunkciis antaŭ nur unu jaro nova, vasta koncertejo ideale taŭga por kongresoj. Ankaŭ la ŝipo Jan Backx, trovita por loĝigi la TEJO-kongresanojn k.a., funkcias kiel surakva hotelo nur de post januaro. Oni do ĝuos nov-ekipitajn ejojn en urbo, kiu entute impresas plej forte per sia moderneco. Same bonŝance troviĝas en Rotterdam aro da lokaj helpantoj, dum ankaŭ el la najbara Hago alveturos helpantoj spertaj pro la 49-a UK en Hago en 1964. Sur tia bazo UEA kuraĝis entrepreni la rapidan organizon de Kongreso, kiu almenaŭ laŭ sia kvalito iom estos komparebla kun tiuj de la pasintaj jaroj. La unuaj reagoj al la anonco pri Kongreso en Rotterdam permesas esperi, ke ankaŭ laŭ kvanto la Kongreso estos sufiĉe impona.

Laboraj aranĝoj

Honora Komitato de nederlandaj eminentuloj, aldona al tiu de Tel Aviv, estas nun formata. Siaflanke, la urbaj instancoj jam donas teknikan helpon kaj verŝajne aranĝos oficialan akcepton dum la Kongreso.

La laboraj aranĝoj planitaj por Tel Aviv restas sen ŝanĝo: kunsidoj de la Estraro kaj Komitato (inkluzive elekton de nova Estraro), Ĝenerala Kunveno de UEA kaj 3 laborsekcioj, pri "Esperanto en fakoj kaj profesioj", "Lerneja kaj eksterlerneja instruado de la Internacia Lingvo" kaj "Esperanto por turismo". Okazis kelkaj modifoj en la anoncita programo de la Internacia Somera Universitato: prelegos prof. Ivo Lapenna, prof. J. Régulo-Pérez, d-ro P. Neergaard, s-ro J. C. Wells kaj du-tri aliaj ankoraŭ ne konfirmitaj. Okazos ankaŭ ĉiuj kutimaj fakaj kunvenoj.

Okazos komuna Oratora Konkurso de la UK kaj IJK. Krom la temoj jam anoncitaj por la UK (aprilo, p. 67), la partoprenantoj povos elekti: "La batalo kontraŭ malsato kaj analfabeteco" aŭ "La rolo de Esperanto en la progresigo de la evoluantaj landoj". La kunveno pri la Belartaj Konkursoj sekvos la tradician skemon. Konkursaĵojn por la Foto-Konkurso

(temo: Moderna Arĥitekturo) oni povas ankoraŭ sendi, ne plu al Tel Aviv sed al Rotterdam.

Internacia Arta Teatro

Ne mankos en Rotterdam la prezentoj de IAT, kiuj jam dek jarojn ornamas la Universalajn Kongresojn. La Oficiala Teatra Vespero, senpaga por ĉiuj kongresanoj, konsistos el "Premiero", dramo de Marijan Matković (aŭtoro de "La morto de Lia Ekscelenco"), "La leciono", komedio de Eugène Ionesco tre sukcese ludita antaŭ 3 jaroj en la Libervola Vespero, kaj "Batalo ĉe Kazan" de Branko Ćopić, komedio. En la alia, Libervola Teatra Vespero, oni povos vidi "Taso da kafo", rakonto de Ivan Cankar, la konatan "Sen eliro" de Sartre, kaj, honore al Julio Baghy, lian "Holanda Pupo", unue enscenigitan pasintjare en Budapeŝto.

Verŝajne estos videblaj ankaŭ du novaj filmoj: la usona "La tago, kiam infanoj interligis la manojn" kaj la hungara "Esperanto-fonto" (vidu aprilo, p. 58-9). La Distra Vespero (mardon la 8-an de aŭgusto) prezentos unuafoje al internacia publiko la kantistinon Ramona van Dalsem. Inter aliaj bonnivelaj eroj estos kontribuo ankaŭ de la aktoro Nikolaj Rytjkov.

London la 7-an de aŭgusto oni povos fari tuttagan ekskurson per ŝipo tra riveroj kaj kanaloj, kun vizito interalie al la haveno de Rotterdam — kiel konate, la plej granda de la mondo kaj ege interesa. Alia tuttaga ekskurso iros suden aŭtobuse, ankaŭ ĝi precipe al regionoj ne vizititaj dum la 49-a UK en Hago. Kompreneble funkcios ĉiutage ekskurso tra Rotterdam.

Bankedo kaj Balo en la festsalonoj de De Doelen, Interkona Vespero kaj Diservoj evangelia kaj katolika provizore kompletigas la programon. Eventualaj novaj programeroj aperos en la Kongresa Libro, nun preparata.

Praktikaj konsiloj

Por aliĝo validas la aliĝilo de Tel Aviv, sed laŭ la kotiztarifo "ĝis 31.3.67" (baza kotizo 77,— gld.). Ĉiu aliĝinto tuj ricevos mendilon por loĝado, ekskursoj ktp. Plej grave estas senprokraste mendi loĝejon, ĉar UEA sukcesis rezervi nur strikte limigitan nombron da litoj. Ne necesas antaŭpagi la loĝadon. Pluraj landaj karavanoj anoncitaj por Tel Aviv funkcios laŭ similaj kondiĉoj por Rotterdam.

Ĉi tie en Rotterdam la laboro estas komenca kun granda entuziasmo kaj optimismo. Rapida kaj multnombra aliĝo antaŭ la 15-a de julio — ĉu plena aliĝo, ĉu nur simbola aliĝo per kotizo de 25,— gld. — certigos vere imponan kaj memorindan Kongreson.

Oficiala Komunikado aperas sur la antaŭlasta kovrila paĝo de ĉi tiu numero. Nepre legu la lastajn informojn sur tiu paĝo.

ROTTERDAM

VASTE MODERNA

De monato al monato videble ŝanĝiĝas la vastiĝanta koro de Rotterdam - ĝistere frakasita dum la Dua Monda Milito, nun rekonstruita kaj -ata laŭ grandskale ambiciaj planoj.




VIVO-GRAVA

Parto de la plej granda haveno de la mondo



SED
RIPOZIGA



Idilia angulo de Rotterdam'a parko tuj apud la ŝipo, en kiu okazos la TEJO-Kongreso.

ENŜIPIĜU EN ROTTERDAM POR OBSERVI KAJ PARTOPRENI LA TEJO-KONGRESON

junularo

Ĝis preskaŭ la mezo de junio la eblecoj organizi la 23-an Internacian Junularan Kongreson ekster Israelo estis tre malhelaj. Nun, tamen, ni povas proponi al niaj membroj kaj apogantoj tute novan kaj iusence eksperimentan kongreson. Ĝi okazos en la kadro de la 52-a Universala Kongreso en Rotterdam, kun malgranda sed enhavoriĉa programo kaj kun espereble vere internacia partopreno.

La kongresanoj kune loĝos en la ŝipo Jan Backx, en la haveno de Rotterdam. Ne temas pri ordinara loĝejo laŭ junulargasteja stilo, sed pri bone ekipitaj kaj grandaj kajutoj, plejparte unu- aŭ dultitaj kaj lukse ekipitaj. La ŝipo mem, ĝis antaŭnelonge oceana vaporŝipo, estas nun uzata kiel lernejo por havenistoj. Ĝi ankaŭ enhavas grandajn publikajn salonojn, kie okazos la Kongresa Balo, kun dancado ne nur en la salonoj mem, sed ankaŭ sur la ferdeko. Kongreso surŝipe: la revo almenaŭ parte realiĝis!

Tie ne finiĝas la mirindaĵoj de la kongreso. Malgraŭ tio, ke niaj financaj perdoj pro la transigo el Israelo estis grandegaj, ni povas proponi al la kongresanoj kelkajn tradiciajn erojn kaj ankaŭ riĉenhavan seminarion kun ses prelegoj pri la ĝenerala temo "Nederlando: Kulturo kaj Socio", kiuj devis formi la kernon de la Eŭropa Junulara Konferenco en Enkhuizen, pri kies organizado oni sindone rezignis por dediĉi siajn fortojn al la IJK. Okazos prelegoj pri literaturo kaj arto, pri politiko, pri la kontraŭmaraj laboroj, ĉiam de alte kvalifikitaj spertuloj. La prelegoj donos unikan

kaj inteligentan enkondukon al la kongreslando, kaj nepras la partopreno de ĉiu UK-ano (la kotizo estas tute malalta).

Eksperimenta ankaŭ estas tio, ke la kongreso estos malfermita al niaj apogantoj. La plenaĝuloj malofte havas okazon vidi la veran TEJO-n — la junularon mem, kiu kune amuziĝas, kune studas, kune sin organizas. La kombino de la du kongresoj kreis ĉi-jare unikan okazon, kiun la Estraro de TEJO tuj kaptis. Plenaĝuloj do rajtos partopreni la IJK kiel "observantoj". Espereble multaj profitos la okazon.

La IJK estas malfermita al ĉiuj gejunuloj kaj ĉiuj apogantoj. Venu multnombre al nia nova kongreso. Enŝipiĝu en Rotterdam!

Rajtas partopreni ĉiuj anoj de TEJO kiel kongresanoj; aliaj personoj kiel observantoj. Ĉiu partoprenanto devas ankaŭ esti ano de la Universala Kongreso.

Kotizo — 10 gld. por la programo de la TEJO-Kongreso.

Loĝigon oni aranĝu pere de la Loĝiga Servo de UK, petante loĝigon kun la TEJO-Kongreso. La kosto de loĝado estos 64 gld. por sep noktoj.

Jamaj pagintoj por Natanja turnu sin tuj al la administracio de la kongreso. Ili ne devos pagi dufoje, kaj sub certaj kondiĉoj ili ricevos parton de la pagita sumo.

Adreso de la kongreso (al kiu oni sendu kotizon): 23-a IJK, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Oni akceptas aliĝojn nun.

ESPERANTO-ELSENDOJ DE BBC

radio

La Brita Radio (BBC) eksperimente elsendadis programojn en Esperanto ĉiun lastan ĵaŭdon, poste vendredon, en la monato dum 10 minutoj. Tiuj elsendoj okazis en la kadro de la Bulgara Programo je la ondolongoj 49, 31, 25 kaj 19 m. Reagoj venis el pluraj landoj, sed ne tiel multaj, kiel oni prave atendis. Aliflanke, ĉar la elsendoj estis direktitaj unuafoje al Bulgarujo, en multaj landoj oni tute simple ne povis ilin aŭdi. Plue, la relative mallonga periodo de tiu eksperimento sendube kaŭzis, ke multaj personoj, kiuj volonte aŭskultus elsendojn en la Internacia Lingvo de unu el la plej gravaj radio-stacioj en la mondo, ne havis la okazon tion fari, ĉar ili tute simple ne sciis ion ajn pri tiuj elsendoj.

La Direkcio de BBC nun decidis interrompi la eksperimenton, sed laŭ kelkaj neoficialaj informoj ŝajnas, ke tiu interrompo estas provizora por ebligi la studadon de la reagoj. Ekzistas, do, espero, ke BBC reenkondukos la elsendojn en la Internacia Lingvo. Tial estas

tre dezirinde, ke ĉiuj personoj, kiuj aŭskultis aŭ provis aŭskulti la elsendojn en Esperanto, skribu tuj al BBC. Tio precipe rilatas al la personoj, kiuj provis aŭskulti vendredon la 26-an de majo kaj nenion aŭdis, ĉar tiu elsendo, jam antaŭe anoncita, ne okazis. Estas grave, ke BBC ricevu kiel eble plej multajn leterojn aŭ eĉ nur poŝtkartojn kun komentoj — ne gravas ĉu pozitivaj aŭ negativaj — pri la elsendoj kaj kun la peto, ke ili estu reestablitaj. Estus ankaŭ tre utile sugesti, ke la elsendoj ne okazu en la kadro de la Bulgara Programo, sed kiel ĝenerala elsendo direktita al kiel eble plej multaj landoj, tiel ke oni havu la eblecon aŭdi sur kiel eble plej vasta teritorio. Bone argumentitaj korespondaĵoj, skribitaj en ĝentila formo, povas multe pli helpi ol senargumentaj protestoj. *La korespondaĵojn bonvolu direkti ĉu en Esperanto, ĉu en aliaj lingvoj, al BBC, External Services, Bush House, London, W.C.2.*

I.L.

esperanto
juli-aŭg. 1967

REZULTOJ DE LA INFORMA LABORO DUM 1966

Pro kaŭzoj klarigitaj jam en la artikolo "Kion atingis la Informaj Fakoj en 1965?" en la juli-aŭgusta numero de "Esperanto" 1966, paĝo 121, ankaŭ en ĉi tiu jaro nur aperas la resumaj ciferoj kun komparo de la antaŭaj rezultoj. Kiel kutime, mi atingis la ciferojn nur post longa atendado kaj kelkfoja admonado en kelkaj kazoj. Kvankam mi bedaŭrinde ne havas respondojn el tiom da landoj kiel dum la aparte favora Jaro de Internacia Kunlaboro, mia plej granda deziro efektiviĝis, nome ke ni gardu la akiritajn poziciojn kaj eluzu la prenitajn kontaktojn por daŭra kvanta kaj kvalita plibonigo de la informado.

Nombroj montras kreskon

Pro la fakto, ke kiel kutime estis bonaj rezultoj en Brazilo, Francujo, Germanujo, Svedujo kaj Usono, ke Hungarujo kaj Israelo havis konsiderindan altigon de la ciferoj pro la Kongresa Gazetara Servo kaj aliaj kaŭzoj, la nombroj jam parte montris kreskon. Tamen plej ĝojiga estas la fakto, ke unuafoje de kelkaj jaroj Jugoslavio kaj Pollando sendis kompletajn raportojn kun rezultoj adekvataj al bona informado de la loĝantaro.

Sekvante alvokojn Argentina Esperanto-Ligo formis Informan Fakon en oktobro 1966, kiu perfekte ekagis sub gvido de s-ro Lázaro Musih, studante la situacion kaj farante realigeblajn planojn. Aperis jam informoj en 58 gazetoj (80 artikoloj, 210 informoj). Tio post sendado de 6 cirkuleroj al 230 gazetoj, sed ankaŭ al radio kaj televido, kiuj helpis. Jam kelkaj personoj diris: Kial ni bezonas informan fakon, ni ja ĉiuj informas ktp.? Jen la opinio de la Informa Fakoj de AEL: "Ĝis nun mankis koncepto pri la nacia, tutlanda informado. Laŭ ĝisnunaj opinioj, oni laboris senplane, preskaŭ familie aŭ en la plej bona okazo urbe kaj en apudurbaj lokoj." S-ro Musih finas: "La estonto montras, ĉu mi pravas." Jen do, kion ni bezonas!

Mi donis tiun ekzemplon por montri, kio devus okazi ankoraŭ en multaj landoj, multaj regionoj kaj ne laste en multaj lokoj per bona informa fakoj de la loka grupo. (Legu tiurilate la broŝuron "La Esperanto-Societo" aŭ la artikolon sur paĝo 42 de la marta numero de "Esperanto" 1965).

En la lastjara artikolo mi alvokis al fondado de lokaj informaj fakoj. Mi atentigis speciale pri la "Principaro de Frostavallen." Necesas denove preni nian Duan Bazan Laborplanon kaj apliki ĝin ankaŭ rilate la informadon.

Per miaj priinformaj cirkuleroj al la landaj informaj fakoj de UEA kaj la individuaj kunlaborantoj de la I. F. de UEA mi sugestas daŭre la plej gravajn entreprenotajn paŝojn. Lastatempe mi lanĉis "Kampanjon por plibonigo de nia informado". Vi demandas eble, kiel vi povas helpi. Kompreneble unuavice per

partopreno en la jam organizita agado. Se ĝi ne ekzistas, ne hezitu anonci vin kiel individua kunlaboranto de la I. F. de UEA. Ĉefe ni bezonas ankoraŭ taŭgajn kunlaborantojn el jenaj landoj, kie ekzistas membroj de UEA, sed el kiuj ni ne ricevas adekvatajn informojn pri informado: Angolo, Bolivio, Ĉilio, Ĉinujo, Filipinoj, Gvatemalo, Hindujo, Honkongo, Indonezio, Irano, Irlando, Koreujo, Kubo, Libano, Maroko, Maŭritanio, Meksiko, Portugalujo, Rumanujo, Senegalio, Sovet-Unio, Tanzanio, Turkujo, Unuiĝinta Araba Respubliko, Venezuelo kaj Vjetnamujo.

Jam nun intimiĝu kun la plej gravaj taskoj: Zorgu kaj helpu, ke la Internacia Gazetara Servo kun landaj kaj eventuale lokaj aldonoj atingu ĉiujn gazetojn, radio- kaj televidstaciojn. Esperante ke vi bone informis pro la 50-a datreveno de la morto de d-ro Zamenhof, mi petas vin ne preterlasi la 80-an datrevenon de la naskiĝo de la Internacia Lingvo. Daŭre informu pri la Propono, kiu troviĝas ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj ties tutmonda apogo. Dum la Jaro de Turismo reliefigu la bonajn turismajn eblecojn de Esperanto rakontante proprajn taŭgajn spertojn. Aktivigu la korespondadon kaj informu pri la bonaj eblecoj de korespondado pere de Esperanto speciale dum la unua semajno de oktobro, "La Internacia Koresponda Semajno".

Detale informiĝu pri du aspektoj de la lingva problemoj, kiujn ni senĉese akcentu: la lingva diskriminacio kaj la teruraj kostoj de la multlingveco. Tiel vi estos ankaŭ bone preparita por la Jaro de Homaj Rajtoj 1968. Detala informiteco estas absolute necesa, ĉar neveraj asertoj ĉiam nur povas malutili. Estas facile ĉerpi tiujn sciojn. Via revuo "Esperanto" daŭre legigas al vi interesajn artikolojn kaj por seriozaj studantoj ankaŭ la valoregaj dokumentoj de CED bone servas.

Se ĉiuj, kies arda deziro estas plibonigi nian informadon — grava parto de nia tuta agado apud la instruado kaj la praktika apliko de Esperanto — faras nur iom, sed tion bone, tiam ankaŭ en la venontjara priinforma raporto la nombroj de artikoloj kaj informoj, de prelegoj, radio- kaj televidprogramoj, de ekspozicioj kaj disdonitaj informiloj estos pli altaj.

Günther Becker
Estrarano pri informado

Resumaj ciferoj pri informado en 1966

Parenteze aperas la ciferoj por 1965: Laŭ 30 (46) respondoj de landaj asocioj aŭ kunlaborantoj aperis 4150 (3522) artikoloj kaj 10371 (8090) informoj en nacilingvaj gazetoj. 1504 (1169) prelegojn ĉeestis 73291 (61573) personoj. Okazis 1034 (500) radio- aŭ TV-programoj. 120 (156) ekspoziciojn vizitis 379 735 (378 784) personoj. Estis disdonitaj 651 343 (443 281) informiloj.

En ĉi tiu dua ĉapitro de sia studo la aŭtoro turnas la atenton al la lingvo kaj rekomendas al studemaj legantoj la plej taŭgajn kaj facile troveblajn verkojn sur tiu kampo.

En nia antaŭa artikolo ⁽¹⁾ ni montris vojon tra la labirinto de la literaturo pri la Movado, ĝia ekesto, historio, organizo ktp. Nia hodiaŭa vojo kondukos nin tra la ĝangalo de la literaturo pri la lingvo mem kun ĉiuj ĝiaj diversaj gramatikaj aspektoj ĝis la sintakso kaj la stilistiko. Ankaŭ nun validas, kion mi jam pli frue diris: ni ĉefe limiĝos al la karakterizado de tiuj verkoj, kiuj estas hodiaŭ facile atingeblaj. Escepton mi faros nur por kelkaj elĉerpitaj verkoj, kies konstanta graveco trudas mencion. Pro praktikeco mi denove — pli aŭ malpli — sekvas la bonegan Klasifon de Butler, kies mirindan detalecon mi tamen ne povas ekspluati ĉi tie.

Unue, tamen, mi volas nomi du verkojn, kiuj meritas esti atente studataj. Ili prezentas kolekton da interesaj kontribuoj pri la gramatiko, vortfarado, prozodio kaj aliaj temoj. Estas:

K. Kalocsay: Lingvo Stilo Formo, Budapeŝto 1931.

Ĝiaj ĉefaj pecoj estas: la Esperanta Vortfarado (iasence la amata ĉevaleto de Kalocsay. Tie li baziĝas sur la antaŭaj laboroj de de Saussure kaj Wüster); la Evoluo de nia poezia lingvo; Esperanta Rimo; Esperanta Ritmo; Klasika Ritmo en Esperanto. Ĉar de tiu verko en 1964 okazis fotorepreso en Japanujo, ĝi estas facile havebla.

La dua verko, kiun mi mencias, estas:

Gaston Waringhien: Lingvo kaj Vivo, La Laguna 1959.

Ankaŭ ĝi estas kolekto de artikoloj, kiujn la aŭtoro parte jam pli frue publikigis. Ili ampleksas de la praesperantaj fragmentoj, tra la ekspliko de la tri kategorioj de verboj ĝis la demando pri neologismoj. La libro estas unu el la plej elstaraj esperantologiaj laboroj kaj la atuto de la mirinda kaj diversflanka aktiveco de Waringhien. Ĝi apartenas al la normaj verkoj de nia lingvo.

E 1 Skribo kaj prononco

Sub E 1 Butler klasifas ĉion, kio havas rilaton al la alfabeto, literado, ĝenerala prononcado, elizio, interpunkcio kaj la uzado de majuskloj. Kvankam pri tio sendube aperis multe da literaturo (en gramatikoj kaj revuoj), mi tamen diros nur unu libron:

Paul Nylén: Sonoj kaj vortoj de Esperanto. Komentario pri elparolo kaj vortfarado. Stockholm 1930.

El fonetikaj vidpunktoj la verko ne taŭgas, same kiel la koncerna parto de Plena Grama-

tiko, kaj ankaŭ pri la vortfarado ekzistas multe pli bonaj studoj, kiel ni vidos.

E 2 Etimologio

(E 20 strukturo de E., E 22 Evoluo, E 23 Derivado, vortteorio, E 24/6 Afiksoj, E 27 Kunmetitaj vortoj, E 28 Vortoj teknikaj)

Unue mi volas mencii esencan broŝureton de L. Jirkov: Kial venkis Esperanto?, Leipzig 1931.

Ĝi klarigas la sociologiajn kaŭzojn, kial Esperanto trovis certan disvastiĝon kaj ne suferis la saman sorton kiel aliaj konstruitaj lingvoj. Similan temon pritraktas broŝuro de Petro Stojan: Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto, Bruĝo 1953.

Kvankam la verko estas instrua kaj interesa, oni tamen ne konsentos kun ĉiuj konstatoj kaj konkludoj de la aŭtoro. Pri etimologiaj demandoj okupiĝas:

Franjo Modrijan: Elementoj latinaj en Esperanto, Lubljana s.j. Konenda estas ankaŭ la konciza, sed bonega studo de

D. B. Gregor: La fontoj de Esperanto, represo el S.R. vol. 9.

Kaj nun kelkaj studoj pri la vortfarado en Esperanto. Ĝian esploron detalan oni komencis sub la atakoj de la idistoj, kiuj reklamis sian projekton supera al Esperanto (Ni ankoraŭ pli ofte vidos, ke estas kutime iuj herezoj, kiuj rezultigas profundajn kaj elĉerpajn studojn.):—

E. Ĉefeĉ: La elementoj kaj la vortfarado, gramatiko kaj sintakso en Esperanto kun notoj pri la novlatinigo "Ido", Paris 1911.

C. Aymonier: Essai sur la dérivation comparée dans les langues naturelles et artificielles, Paris 1921.

Paul Fruictier: La Esperanta vortfarado laŭ la Fundamento, Paris 1914.

René de Saussure (Antido): La vortstrukturo en Esperanto.

René de Saussure: Konkurso: Kia estas la logika senco de l' vorto "grando" (Ald. al GE, maj 1911). Ĉi tie estas disvolvita la leĝo de neceso kaj sufiĉo.

JRG Isbrücker: Pri la vortfarado en Esperanto (represo el Esperantologio II: 13-36, 1959). El la tuta listo ĝi momente estas la sola havebla titolo.

E 3 Vortaroj

E 3 klasifas la Esperanto-vortarojn kaj verkojn pri leksikologio. Mi limiĝos al la citado de kelkaj gravaj internacie uzeblaj vortaroj, ĉar ĉio alia interesus ĉefe nur la specialiston. Valoran enkondukon en la leksikologion de

(1) vd. revuo "Esperanto", Junio 1967.

Enkonduko en la libroskiencon de Esperanto (daŭrigo)

Esperanto donis prof. Waringhien en sia ISU-prelego, 1963. ⁽²⁾

Efektive ni povus nomi jam sub la etimologio la vortaron de

Louis Bastien: Naŭlingva Etimologia Leksikono de la lingvo Esperanto, Paris 1907 (Rickmansworth ² 1950).

Tiu vortaro estas facile atingebla en la dua eldono (kiu tamen forreziĝas la rusan alfabeton) kaj devus troviĝi en via biblioteko.

Pri nia oficiala vortmaterialo eliris, siatempe sub la aŭspicio de la Lingva Komitato, tuta amaso da bonaj verkoj, el kiuj kelkaj estu cititaj:

E. Boirac: Vortaro de la Oficialaj Radikoj de Esperanto, Paris 1911. (Kolekto de la Revuo).

Ĝi enhavas la radikojn de la Universala Vortaro (UV) kaj tiujn de la Unua Oficiala Aldono (OA). La radikojn de UV kaj de la tri OA listigas:

Th. Cart: Vortaro de la Oficialaj Radikoj de Esperanto, Paris 1922

Plej bona estas simila entrepreno de Eugen Wüster, kiu krom UV kaj OA 1-3 ankaŭ donas bibliografiajn indikojn kaj fiksas la gramatikan karakteron de la radikoj:

Eugen Wüster: La Oficiala Radikaro kun enkonduko kaj notoj, Berlin/Dresden 1923, suplemento en Junio 1932.

Estu fine, ne laste, nomita:

E. Grosjean-Maupin: Oficiala Klasika Libro de Esperanto, Paris 1924.

Ĝi enhavas ĉiujn ĝis 1924 oficialajn vortojn kun tradukoj en la F, A, G. ⁽³⁾

La plej kompleta ĝis hodiaŭ kompendio por la Zamenhofa vortmaterialo estas leksikologie elstara verko de

Eugen Wüster: Zamenhof-Radikaro, Leipzig 1927,

kiu kune kun la Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana apartenas al la atutoj de nia leksikologio. Du gravaj internaciaj vortaroj estas:

Kabe: Vortaro de Esperanto, Paris 1910, ² 1922.

Ĉe la nova generacio de esperantistoj ĝi ne plu estas konata, sed ili kun profito konsultados la

Plena Vortaro de Esperanto, de Grosjean-Maupin, Esselin, Grenkamp-Kornfeld kaj Waringhien.

⁽²⁾ Publikigita en: MK 1(1963/64)161-68. Kp. ankaŭ lian ISU-prelegon 1964 pri "La evoluo de la Esperanta vorttrezoro", en: MK 1(1964)263-67, 280.

⁽³⁾ Fakte ĉi tie ni devus mencii ĉiujn Oficialajn Vortarojn, radikarojn, OA al la UV, sed la demando intereso nur la vortariston. Krom tio, flanke de la Akademio, oni anoncis la eldonon de kolektitaj dokumentoj, kiuj supozeble entenos ankaŭ verkojn el tiu kampo.

Ĝi travivis jam ĉ. 8 eldonojn, sed ekde la tria estas fotorepreso de la dua.

Rilate la fakajn vortarojn ni referencas al la dokumento CED E/V/3, baldaŭ aperonta.

Nun ni jam forlasu tiun ĉi kampon por turni nin al la pli serenaj regionoj de la gramatiko. Tamen, ne timiĝu! Mi ne turmentos vin longe per tio, ĉar mi volas limiĝi al kelkaj verkoj.

E 5 Gramatiko kaj Sintakso.

Jam antaŭe mi nomis al vi du verkojn de Kalocsay kaj Waringhien. Ni tuj revenu al tiuj aŭtoroj kaj aldonu plian ilian ĉefverkon:

Plena Gramatiko de Esperanto, kiu nun aperas en la tria eldono. La studadon atentan de tiu grandioza verko mi povas nur plej varme rekomendi al ĉiuj interesitoj. Alia gramatika libro, tute en Esperanto, estas:

Anakreon Stamatiadis: Nova gramatika libro, Ateno 1928.

Ankaŭ tute en Esperanto estas la gramatiko de L. Kitzler, 1931. Pri ĝi ni tamen devas atentigi, ke la uzadon de la pasivaj participoj ĝi ne instruas laŭ Zamenhof, sed laŭ ia ĝermana komprenmaniero.

Ĉar tiuj gramatikoj tuŝas kaj pritraktas ofte eĉ detale multajn gramatikajn demandojn, mi ne bezonas nun grande elnombradi multajn monografiojn, sed atentos nur la plej gravajn. Bonan studon pri la pronomoj verkis:

Kenji Ossaka: Pronomaj studoj, 1953. (Eld. en Japanujo).

Tre multe, sed ne ĉiam saĝe, oni verkis dum la lastaj jaroj pri ata/ita. Jen la plej gravaj titoloj:

Teo Jung: La kunmetitaj verboformoj, Scheveningen 1960-61 (2 vol.).

Teo Jung: La Esperanta Konjugacio, Scheveningen 1965-66 (2 vol.).

Setälä-Stöp-Bowitz-Vilborg: Esperanto — moderna lingvo, Helsinki 1965.

Tio estas la plej gravaj (libroformaj) verkoj, kiuj forlasas la Zamenhofan Esperanton. Ĝin defendas la jenaj verkoj:

La Zamenhofa Esperanto. Simpozio pri ata/ita, La Laguna 1961.

K. Kalocsay: Vojaĝo inter la tempoj, La Laguna 1966.

Plej profite la simpla esperantisto legos la bonan verkon de

Raymond Schwartz: Ne kiel Meier!, Paris 1963.

El aliaj gramatikaj verkoj mi nomos nur ankoraŭ du:

H. A. de Hoog: La senpera verbigo de adjektivoj, 1955.

H. A. de Hoog: Du malsanoj en Esperanto, 1954.

Tiujn du verkojn ĉiu legos kun granda profito, ĉar la aŭtoro havas la talenton eĉ pri seka materialo rakonti vigle kaj intereskapte.

Nun ni devus paroli, se ni daŭre sekvus la Klasifon de Butler, pri Versfarado, Reformoj, Lernolibroj. Nu, la materialo ne abundas, kaj

(daŭrigo dekstre)

Jaroj sur tero, memoroj de Lakshmiswar Sinha. Eldona Societo Esperanto, Malmö 1966. 126 p. 19 x 12 cm., bind. 11,50; br. 8,50 gld.*

Ĉi tiu verko estas la vivrakonto de simpatia homo, kiu "volis esplori novan vojon en la vivo kaj ne sekvi la kutiman", kies vivcelo estas eltrovo de la "perfekta vivarto" kaj "atingo de tia stato, kie la morto ne povas influ la vivon". Sur la mortolito, lia vizaĝo estos trankvila kaj nee li kapgestos, se iu demandos, ĉu li havas plenumendan deziron. Ĉiam li sekvis la voĉon de sia konscienco, kaj ĉiam li faris tion, kion li opiniis la plej bona por siaj homfratoj senkonsidere pri mono aŭ materiaj komfortoj.

Kiuj konas la simpatian Lakshmiswar Sinha

de "Hindo rigardas Svedlandon" trovos ĉi tie multe pli maturan varianton de tiu homo, kaj la lingvo, stilo kaj vortelekto, ĉio atestas pri ĉi tiu maturiĝo, kiun povas atingi nur homo, kiu vivis sian vivon ne nur riĉe kaj profunde sed ankaŭ komprenante, pesante kaj prijuĝante ĉiun viveron. La tradukinto de "Malsata Steno", kiu montras tie stilon bonan sed ne elstaran, montras ĉi tie preskaŭ poezian prozon, kies ĉiu vorto kaj ĉiu frazo estas la plej taŭga sur sia loko: eĉ ne unu vorto mankas, kaj ne estas vorto superflua. La stilo — tute neniel perdante plej severan internaciecon — havas iel nekompreneble hinda etoson. Ĉi tiel li povas sukcese sentigi al la leganto la etoson de sia infanaĝa hejmo, kiu estis vere tute hinda kaj netuŝita de la angla kulturinfluo, kaj kiu havis profundan influon sur la vivo-vojo de la aŭtoro: sen ĉi tiu influo, la inteligenta junulo hodiaŭ estus iu riĉa sed sennoma inĝeniero aŭ io simila.

Aparte interesa al ni estas la rakonto pri lia muteco en Svedujo, kie la angla ne funkciis kaj hinda junulo senluziĝis. Ankaŭ la esperantistiĝo de la aŭtoro kaj liaj spertoj pri kaj per Esperanto estas aparte valoraj.

Min tre interesis, ke la aŭtoro, kiu antaŭe ne edziĝis por povi dediĉi sian vivon al bono de la homaro, poste skribis, "sen edziĝo oni ne fariĝas kompleta ano de la socio." Ankaŭ foton de lia edzino oni trovas en la libro, sed mia scivolo pri ŝia nomo restis neestingita.

Pri transskribo de hindaj nomoj regas vera ĥaoso de bonaj esperantigoj apud anglaj misnomaĉoj. Estas "Iŝvar Ĉandra Vidjasagar" apud "Lakshmiswar" (Lakŝmiŝvar), "Kalikato" apud "Karimgunj" (Karimgaŝ), "Maharaŝtra" apud "Punjab" (Paŝab), k.s.

Tre erara estas la aserto de la glosinto B. Nilsson, ke la anglaj pluraloj "asuras" kaj "devas" (de "asura" kaj "deva") estas la veraj pluraloj.

Aŝvinikumar' (Hindujo)

Katolika terminaro por japanaj esperantistoj, de Matubara hatirō. Eld. la aŭtoro, Japanujo, 1966. Unua parto, 40 p. 25 x 18 cm., ofsetita. 1,— gld.*

Kiel diras la aŭtoro, kvankam la katolikoj en Japanujo estas malmultaj, tiu ĉi verko estos tre taŭga por ĉiuj, kiuj deziras havi klaran informon pri la strukturo kaj organizo de la Katolika Eklezio kaj aliaj kristanaj religioj kompare al la Roma eklezio. La libro ne estas terminaro laŭ la senco de la aliaj Katolikaj Terminaroj de la Serio I.K.I. (Internacia Katolika Informejo); la terminoj ne estas listigitaj sed laŭteme klarigitaj. En la 10 lastaj paĝoj estas resumo en la japana lingvo.

La aŭtoro povas esti kontenta, ĉar, kvankam li estas simpla laiko, li faris bonegan informon pri la temo.

J. M. Claramunt, Sch. P. (Hispanujo)

la lernolibrojn ni lasas ekster nia konsidero. Menciitaj tamen estu:

Parnasa Gvidlibro de Kalocsay kaj Waringhien, kies dua eldono devus nun aperi en Polujo. — Kaj mi ne devas preterlasi rekomendi al vi la brilan studon de

Edmond Privat: *Esprimo de sentoj en Esperanto*, Genève 1931 (Den Haag 1957).

Rilate la lerno- kaj lego-librojn ni devas, pro ilia graveco, tamen mencii:

L. L. Zamenhof: *Fundamento de Esperanto*, Paris 1905.

Tiu verko, baza kaj norma, devas esti uzata nur en la 9a eldono, kun la kritika aparato de d-ro A. Albault. Tiu nova eldono donas ankaŭ la necesajn bibliografiajn indikojn por pli fundaj studoj. — Alia verko, same de la aŭtoro de Esperanto, estas:

Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto, Paris 1903.

La lasta, 17a, eldono aperis en Rickmansworth, 1954. Ni devas averti, ke tiu 17a eldono ne ĉiam estas fidinda en la lingva prinotado de la teksto. (*)

Ni finos tiun ĉi parton de nia prelego per la mencio kaj rekomendo de unu plia verko de Zamenhof, kiu ĵetas lumon sur preskaŭ ĉiujn gramatikajn demandojn kaj kiu ĉiam estos bonvena konsultilo:

L. L. Zamenhof: *Lingvaj Respondoj*, Marmande 1962.

Estas plej utile ĝin uzi en tiu 6a eld. (1962), ĉar ĝi estas pli ampleksa ol la antaŭaj kaj provizita per multaj valoraj kaj necesaj piednotoj de Waringhien.

Post tiu vagado tra nia propra regno ni riskos, en la sekva parto de nia prelego, paŝojn en la kuriozan kaj eĉ pli ekzotikan regnon de la interlingvistiko.

(*) Ni planas la aperigon de detala artikolo pri FK, en kiu ni ankaŭ okupiĝos larĝe pri la 17a eldono.

GRABOWSKI — KOMENCANTO

La nova jaro de Boleslav Prus; **Janko-muzikanto** de H. Sienkiewicz. Eld. Tümmel, Nürnberg, 1891; faksimila reeld. KOKO, Kopenhago, 1967. 20 p. 20 x 13 cm. Du rakontoj. 5,— gld.*

"En la tago de la unua Januaro, la ricevantoj vizitojn penas kaŝi la oscedon, la elpagantoj la donacojn ne havas bonan humoron kaj la ricevantoj elridas la oferdonantojn. Dirante mallonge, sin formas senorda movado".

Jen mozaiko de kelkaj linioj el Esperanta libro, eldonita de Koko, Jyllinge-Roskilde, Danlando, en 1967!

Sed tiu Esperanto datiĝas de 1891. Nome, Koko havis la bonegan ideon, reeldoni vicon de la plej fruaj Esperantaj literaturaĵoj. Kiel unua aperis: Du Rakontoj en la lingvo internacia Esperanto", tradukitaj de A. Grabowski.

La libroj estos fidelaj fotopresoj kaj donos al la tria generacio de la esperantistaro okazon detale pristudi la evoluon de la lingvo.

Abonantoj de la serio pagos po 8 dan. kr. por minimume 4 libroj; unuopaj ekzempleroj kostos 10kr.

Varme rekomendita!

H. A. de Hoog (Amsterdam)

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Kongreslibro de la 19a Kongreso de IFEF, Fulda, 6-12.V.1967. 68 p. 17 x 12 cm., il.

Korektiga listo kaj suplemento n-ro 1 al Poŝtstampa katalogo de EKIĶ 1965. Eld. EKIĶ, ĉe s-ino A-G. Strönné, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo. 7 p. 30 x 21 cm., multobl.

Jarlibro 1967-68. Eld. IKUE, Svislando. 67 p. 13 x 11 cm.

Kun la defendantoj de Kon Ko, de Ngjen khai. Fremdlingva eldonejo, Hanojo, 1967. 115 p. 19 x 13 cm. Batalraporto.*

Sendependecon kaj pacon al la vjetnama popolo! Fremdlingva eldonejo, Hanojo, 1967. 53 p. 19 x 12 cm.

Verkoj de hungaraj verkistoj en Esperanto. Eld. Kultura (?), Budapeŝt, 1967. 15 p. 14 x 10 cm. Katalogo.

Kontraŭ liberalismo, de Maŭ zedong. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1967. 4 p. 15 x 10 cm.*

Certe triumfos la popolo de Vjetnamio! Kvara kajero. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 60 p. 26 x 23 cm. Foto-broŝuro. 0,40 gld.*

Certe triumfos la popolo de Vjetnamio! Elektitaj verkoj kreitaj de ĉinaj artistoj. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 92 p. 26 x 24 cm., parte kolorpresita. Pentraĵoj, gravuraĵoj ktp. 2,05 gld.*

Fortoj de l'vivo, verkaro de Vilho Setälä. Eld. Fondumo Esperanto, Helsinko, 1967. 208 p. 21 x 15 cm., ofsetita, ilustr.* Bd. 15,— gld; broŝ. 8,— gld.

4 aŭtoroj kaj Trilogio. Eld. Instituto Teozofia Uruguay, Av. Ramón Anador 3720 B., Montevideo, 1965 kaj 1966-7 resp. 81 kaj 63 p., 17 x 11 cm., multobl. Prezoi neindikitaj.

La disfloro de nacia vivmaniero en S. Uzbekistano. Eld. Komisiono de esperantistoj, Taŝkent, 1967. 24 p. 23 x 15 cm., ofsetita.

La kaŝmira kanto, legendo de Ŝaraf Rasidov. El la rusa (?) tr. Petro Poliŝĉuk. Eld. Komisiono de esperantistoj, Taŝkent, 1967. 26 p. 23 x 15 cm., ofsetita.*

Hungaraj ŝlagroj kaj popolkantoj. Eld. Hungara Esperanto-Junularo, Budapeŝt, 1967. 15 p. 14 x 10 cm. Tekstoj sen muziko.* 0,25 gld.

Suito '67, originala hajkaro. Div. aŭtoroj. Eld. Hajkista Klubo, Oosaka, 1967. 51 p. 18 x 11 cm., ofsetita.*

Kantoj de l'amo kaj patriotismo. El jugoslavia literaturo. Komp. kaj trad. Boriŝa Miliĉević. Eld. Centralno KUD Ŝelezniĉara, Niŝ, Jugoslavio, 1965. 52 p. 29 x 20 cm., multobl. Tekstoj sen muziko.

Poŝ-kantaro de KLEG. 2-a kajero. Eld. Kansai-Ligo de Esperanto-Grupoj, Osaka, 1966. 24 p. 15 x 11 cm., ofsetita, il. Tekstoj sen muziko.*

Bibliografio de Internacia Lingvo en Jugoslavio II (1954-1967), de Marinko Gĵivoje. Represo el "Vjesnik Bibliotekara Hrvatske", Zagreb, 1967. 11 p. 25 x 17 cm. 1,80 gld.*

Ludwik Zamenhof, de Edmond Privat. En la norvegan trad. Trygve Raimar. Eld. Dreyers Forlag, Oslo (1959). 100 p. 19 x 13 cm.* 1,75 gld.

Esperanto-English Dictionary (vortaro Esperanta-angla), de Montagu C. Butler. Eld. BEA, Londono, 1967. 450 p. 18 x 12 cm., bd.* 12,50 gld.

Statuto, Ĝenerala Regularo, Kongresa Regularo. Eld. Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), Utrecht, 1966. 16 p. 21 x 15 cm.

NEKROLOGOJ

RUDOLF NOVÁK (1882-1967)

Forpasis en Plzeň, Ĉeĥoslovakujo, inĝ. R. Novák, malnova aktivulo de la ĉeĥa movado kaj iama delegito de UEA.

MARCEL COUSINEAU

Mortis la 10-an de aprilo 1967, 55-jara, s-ro M. Cousineau. Li estis membro de LKK de la 42a UK en Marseille, kaj regula ano de la Universalaj Kongresoj.

CHARLES BRUNET (1875-1967)

En Bordeaux, Francujo, forpasis s-ro Charles Brunet, honora membro kaj dumviva membro de UEA, 92-jara. Li kunfondis la grupon de Bordeaux en 1902, kontribuis al La Revuo, partoprenis la 1-an Universalan Kongreson kaj oficis kiel delegito de UEA ekde la fondo en 1908 ĝis 1965: entute 57 jarojn! Li multe kontribuis al la loka movado kaj dum la Unua Monda Milito faris grandajn servojn en la laboro de UEA por retrovado de personoj.

ALICE DOUGLAS

Mortis en Aŭstralio s-ino Alice Douglas, prezidantino de Tasmania Esperanto-Asocio de 1940 ĝis 1943, la unua oficiala ekzamenisto por Esperanto en tasmaniaj lernejoj.

LAŬLANDE

Belgujo

● Ornitologia Rondo Esperantlingva kaj Internacia Geografa Asocio (ambaŭ kunlaborantaj fakaj organizaĵoj de UEA) ĉi-jare kombinis siajn konferencojn kun ne-Esperanta kultura arango en Woumen, Belgujo. De 3 ĝis 9 julio okazis prelegoj kaj diskutoj en Esperanto kaj la nederlanda kun dudirekta tradukado; krome ekskursoj, filmoj ktp.



Televido TV-TUPI en Rio de Janeiro montris oratoran kaj kantistan konkursojn en Esperanto. Gustavo Barbosa kaj Leryde Maria kantis "La muzikistaro" de Chico Buarque Hollanda, ĉefpremiita en la Brazila Festivalo de Popolaj Kanzonoj.

Britujo

● La malavaro de s-ro E. F. Dean (dumviva membro de UEA) ebligis starigon de "Esperanto-Fondaĵo de la Jubileo en Norwich", kiu donos stipendiojn al junaj Esperanto-lernantoj kaj esplorigos instrumentojn de Esperanto.

Ĉeĥoslovakujo

● Popola Astronomia Observatorio (Ludová hvězdárna) en Žilina organizas migrantan ekspozicion de infanartaĵoj pri la temo "Kosmo kaj infanoj" kaj petas kontribuojn ĝis la 30-a de julio 1967.

Finnlando

● Prof. B. Popović el Jugoslavio faris en aprilo invititajn prelegojn pri astronomio al finnaj astronomiaj societoj kaj en la universitatoj de Turku, Helsinki kaj Jyväskylä, originale en Esperanto kun finna traduko.

Francujo

● Ĉe la 59-a Franca Kongreso de Esperanto s-ro Jacques Vendroux, deputito-urbestro, pre-

zentis al s-ro René Llech-Walter la oran medalon de Calais pro lia 10-jara prezidanteco de UFE. Oni elektis d-ron A. Albault nova prezidanto de UFE. UFE lanĉis kampanjon por atingi 2000 membrojn.

Germanujo

● Nova redaktoro de la ŝtate financata "Okcident-germana revuo" estas Ulrich Lins, vicprezidanto de TEJO.

Hindujo

● Ekaperis presita gazeto "Hinda Esperantisto", ilustrita, plejparte en Esperanto, ŝajne dumonata. Adreso: Hinda Esperanto-Asocio, 149-D, Kamla Nagar, Delhi-7.

Usono

● En la kongreso de ELNA (St. Louis, 6-9 julio) prelegis Duncan Charters, el Britujo, kaj s-ino Yukiko Isobe el Tokio. Okazis du ekspozicioj lige kun la kongreso: en la kongresejo kaj en la Centra Publika Biblioteko.

Vjetnamujo

● Katalogo de la Fremdlingva Eldonejo en Hanojo pri libroj eldonataj en 1967 montras, ke Esperanto okupas la kvaran lokon (9 libroj) post la franca (14), angla (13) kaj hispana (10), sed antaŭ la rusa (7), ĉina (2) kaj aliaj.

LAŬFAKE


Muziko

● La nederlanda kantistino Ramona van Dalsem, kies unuan Esperanto-diskon eldonis UEA sub la titolo "La feliĉo", la 14-an de aprilo venkis en tutlanda amatora kantkonkurso per sia prezentaĵo en Esperanto. Radio KRO elsendis.

Turismo

● Fine de 1967 aperos ĉe la Hungara Akademio Eldonejo 500-paĝa turisma vortaro hungara-Esperanta kaj Esperanta-hungara. Verkis Alfonz Pechán kunlabore kun Kálmán Kalocsay.

● Aperis novaj prospektoj en Esperanto pri Mohács, Aggtelek-Jósvafő kaj Esztergom (Hungarujo), Turku (Finnlando), Norrköping (Svedujo), Ostrava kaj Rožnov (Ĉeĥoslovakujo) kaj pri Danlando ("Danio en bildoj"). Oni petu ilin de la koncernaj turismaj oficejoj.



Prof. Popović kun prof. Yrjö Väisälä, prezidanto de ISAE, en Turku. (Vidu Finnlando)

esperanto
juli-aŭg. 1967

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-PARIS 16, Francejo.
En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu la jarlibron 1967, 1-a parto, pp. 130-131.
Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ĉiutage	15.30-16.00	Warszawa, 42.11 m (7125 kcs), 41.99 m (7145 kcs), 31.50 m (9525 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 31.01 m (9675 kcs), 25.34 m (11840 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.
	19.30-19.45	Budapest, 240 m (1250 kcs), 48.10 m (6234 kcs), 42.25 m (7100 kcs), 41.55 m (7220 kcs), 30.51 m (9833 kcs), 25.19 m (11910 kcs), 19.79 m (15160 kcs). I.P. Radio Budapest, Esperanto-dissendoj, Budapest VIII, Hungarujo.
Dimanĉo	11.00-11.30	Pekino, 47 m, 40 m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
	12.30-13.00	Pekino, 25 m, 19 m. I.
	20.00-20.20	Roma, 41.24 m (7270 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	20.05-20.30	Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	21.30-21.45	Teresina, 210 m (1430 kcs), 88.63 m (3385 kcs). I. P. Radio Clube de Teresina, Rua Barroso 175, Teresina (Piauí), Brazilo.
	23.30-23.55	Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.
Lundo	00.15-00.45	Muritiba, 216 m (1390 kcs), I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
	12.00-12.10	Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.
	22.45-23.00	Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Merkredo	6.45- 6.55	Gdańsk, 230 m (1304 kcs). I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk, Poll.
	12.00-12.10	Bern, Kiel lunde. (S-ro C. Gacond).
	18.45-19.00	Resende, 196 m (1530 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.
	23.30-23.55	Bilbao, 212 m (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Hisp.
Ĵaŭdo	21.45-21.55	Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 kcs m (9535), 25.25 m (11880 kcs), 19.60 m (15305 kcs). P. (D-ro Baur)
	23.05-23.20	Zagreb, 264 m (1133 kcs), P. Radio Zagreb, Jugoslavujo.
	23.05-23.20	Beograd, 439 m (683 kcs), 48.78 m (6150 kcs). P. (programo de Zagreb).
Vendredo	14.30-14.40	Wien, 203 m (1475 kcs), 97.9 Mcs (MF). P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	20.00-20.30	Pekino, 45 m, 42 m, 39 m, 38 m, 32 m. I.
Sabato	11.00-11.30	Pekino, kiel dimanĉe.
	12.30-13.00	Pekino, kiel dimanĉe.
	20.00-20.30	Pekino. Kiel vendrede.
	21.45-21.55	Bern. Kiel ĵaŭde (S-ro C. Gacond).
	22.00-22.30	Uberlândia 191 m (1570 kcs), I.K. Rádio Cultura de Uberlândia, Minas Gerais, Brazilo.

NOTO: La stacioj Warszawa, Pekino, Bern, Roma regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.

RADIO ROMA. 2-VII, Tra la literaturo; 9-VII, Novaĵoj el Italujo; 16-VII, Italaj kanzonoj en Esperanto; 23-VII, Leterkesto; 30-VII, Kristana mondo; 6-VIII, Famaj italaj aktoroj: Toto (A. de Curtis); 13-VIII, Loko de la romano "La gefianĉoj" de A. Manzoni; 20-VIII, 52-a Universala Kongreso de Esperanto; 27-VIII, Esperanto-kantistino Ramona van Dalsem. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". Redaktoro: Luigi Minnaja. Atentu, ondlongoj ŝanĝiĝis.

MEMORIGA KALENDARO

Julio

7-10	Kultura Festivalo, Opava, Ĉeĥ.
8-15	Somera Universitato, Gyula, Hungarujo
8-16	Int. Jun. Seminario, Turyn/Praha, Ĉeĥ.
9-11	Balta renkontiĝo, Rostock, Germanujo
15	Limdato por aliĝo al UK Rotterdam
16-19	Int. Renkontiĝo, Jihlava, Ĉeĥoslovakujo
17	Turista Festo, Monto Vitoŝa, Bulgarujo
18-23	Hispana Kongreso, Zaragoza
22-24	Aŭstra Kongreso, Knittelfeld, Stirio
22-29	KELI-Kongreso, Torre Pellice, Italujo
23-24	Balkana Renkontiĝo, Bela Palanka, Jug.

23-30	Eŭropa Kongreso, Innsbruck, Aŭstrujo
	Int. Feriaj Kursoj, Helsingør, Danujo
23-6/8	Turismaj-kulturaj Ferioj, Grésillon, Fr.
26	80-jara datreveno de publikigo de Esp.
29-5/8	SAT-Kongreso, Malmö, Svedujo
29-9/8	Balta Tendaro, Vilnius, Soveta Unio
30-7/8	Int. Ferio-Semajno, Krommenie, Ned.
31-12/8	Int. Sem. Blinduloj, Köln, Germanujo
Aŭgusto	
2-9	52-a Universala Kongreso, Rotterdam
	23-a Kongreso de TEJO, Rotterdam
10-20	Int. Pedagogia Seminario, Szeged, Hung.
13-25	Uzbeka Tendaro, Ĥamzaabad, Sovetio
19-22	Int. Renkontiĝo Szolnok, Hungarujo

LA JUNA VIVO

Oficiala organo de

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

TEJO-KONGRESO EN ROTTERDAM

Legu sur paĝo 107 gravan anoncon!


LA UNUA FESTIVALO DE HEJ

Laŭ la ekzemplo de la famaj kulturaj festivaloj de Bulgara Esp. Junularo, nun ankaŭ en Hungarujo, en Dunakeszi, la unua tia festivalo okazis. Ĝin partoprenis 245 gejunuloj el ĉiuj partoj de Hungarujo. Ĝia programo konsistis i.a. el konkursoj: oratora, deklama, kantĥora, konkurso de maskoj por la infanoj, ktp.

En la programoj tre aktive partoprenis ĉiuj grupoj de la infana suborganizaĵo de HEJ, la Infana Rondo Amika. Dum la festivalo s-ino Mária Benczik, gvidantino de la Rondo, tre fruktodone interparolis kun la ĉeestantaj instruistoj.

Tre ĝojigis la amasa partopreno kaj la alta nivelo de la konkursoj. Ekzemple, la deklamkonkurson por ĝenerallernejanoj partoprenis 72 gelernantoj, la kantokonkurson 6 ĥoroj.


La hungara gazetaro jam anticipe raportis pri la aranĝo. La centra gazeto de la Hungara Pionira Asocio, Pajtás (Kamarado) sendis apartan ĵurnaliston, kiu partoprenis ĉiujn aranĝojn de la festivalo. La venkintoj en la konkursoj ricevis belajn premiojn, plejparte donacitaj de ekstermovadaj instancoj, i.a. Hungara Komunista Junulara Asocio, kaj Entrepreno por sondiskoj. Entute la festivalo estis tre sukcesa, kio unuavice fontas el la forta bezono pri tiaj aranĝoj flanke de la lerneja junularo.



El la Festivalo de HEJ en Dunakeszi: la plej juna partoprenanto transprenas premion.

GUANABARA ESPERANTO-JUNULARO

Laŭ siaj regulaj raportoj la Brazila GEJ daŭre aktivas kaj prosperas. Dum la lastaj monatoj de 1966 okazis pluraj estraraj kaj membraraj kunvenoj, komenca kaj perfektiga kursoj, eldonoj de la bulteno "Meteoro" kaj de portugallingva prospekto: "Esperanto por komencantoj". Krome membroj de GEJ prezentigis en radio-programo (30-minuta intervjuo kun brazilaj kantoj en Esp.), kaj en du televidaj programoj. Unufoje temis pri brazilaj kantoj en Esp., dua-foje pri oratorajo: "Esperanto, lingvo de harmonio".



KONGRESO EN CALAIS

Gejunuloj el deko da landoj vigle partoprenis la nacian kaj markolan kongreson de Calais. Afrika studento transdonis donacon – "La Dia Komedio" – al la deputito-urbestro.

KVINPINTO

Tiu teknike kaj enhave tre bone zorgita gazeto de la sveda TEJO-sekcio havas en sia ĵusa numero internacian diskuton pri la helpo al evolulandoj. Krome ĝi estas leginda pro la konstantaj rubrikoj, ekz. la poezia paĝo (ĉi-numere avangardista) kaj satira paĝo.

Kvinpinto estas abonebla por 4 sv.kr. (7 rpk) ĉe Box 4235, Malmö 4, Svedujo. Unuopaj ekzempleroj de la ĵusa numero estas ankaŭ haveblaj por 1 sv.kr. (2 rpk).

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1967

stato je la 31-a de majo 1967

Konkurso I

	Lando	kvoto	poentoj	%
1.	Francujo	7752	6202	80,01
2.	Nederlando	5975	4686	78,43
3.	Britujo	6691	5200	77,72
4. (6)	Usono	4526	3380	74,68
5.	Hispanujo	3250	2340	72,—
6. (4)	Finnlando	3160	2205	69,78
7.	Svedujo	7180	4300	59,89
8.	Italujo	4220	2410	57,11
9.	Belgujo	2055	1165	56,69
10.	Danlando	3099	1730	55,82
11.	Svislando	2459	1325	53,88
12. (13)	Brazilo	3856	1889	48,99
13. (12)	Japanujo	3965	1925	48,55
14.	Germanujo	7221	3480	48,19
15.	Jugoslavio	5375	1720	32,—

Konkurso II

1.	Islando	250	230	92,—
2. (3)	Kanado	1124	925	82,30
3. (2)	Aŭstrujo	1475	1200	81,36
4.	Aŭstralio	1475	1034	70,10
5. (8)	Nov-Zelando	1481	1018	68,74
6.	Israelo	595	365	61,34
7. (5)	Sudafriko	260	155	59,62
8. (7)	Argentino	905	500	55,25
9.	Madagaskaro	250	122	48,80
10.	Norvegujo	1755	685	39,03
11.	Grekujo	270	100	37,04

(Vidu la regulojn sur paĝo 33. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

esperanto
juli-aŭg. 1967

ELEKTO DE KOMITATANOJ B

Jus okazis la voĉdonado pri komitatanoj B por la venonta laborperiodo (vidu jan. no. "Esperanto" 1967, p. 13. La limdato por sendi la voĉdonilojn estis la 31-a de majo 1967. Estis proponitaj 8 kandidatoj por 6 liberaj lokoj. La elektoj okazis laŭ la preskriboj en art. 28 de la Ĝenerala Regularo de UEA (vidu p. 157 de Jarlibro 1959, Unua Parto).

Voĉdonis entute 695 delegitoj (unu nevalide). La tutmonda delegitaro elektis per la parenteze indikitaj nombroj da voĉoj la jenajn personojn, laŭ alfabeto sinsekvo: D-ro A. Albault (570), Prof. D-ro I. Lapenna (619), Prof. J. Régulo-Pérez (590), K. Söderberg (514), C. Stöp-Bowitz (509), D-ro H. Tonkin (507). La ceteraj kandidatoj estis: H. Bakker (443) kaj s-ino J. Vincent (350).

La komisiono por kalkulado de la voĉoj konsistis el la jenaj personoj, ĉiuj dumvivaj membroj de U.E.A.: F-ino E. M. Maasbommel, F-ino J. H. v. d. Hengel kaj F-ino M. H. Vermaas, direktorino de la C.O. Per sia subskribo ili konfirmis la korektecon de la supremenciita rezulto de voĉdono.

M. H. Vermaas
Direktorino C.O.

VIZITANTOJ AL LA C.O.

La C.O. volonte akceptas vizitantojn por montri al ili la propran domon de la Asocio kaj la funkciadon de la laboroj. Ili venu prefere inter la 13-a kaj 14-a horoj aŭ inter la 17-a kaj 18-a. Ili ne forgesu, ke la geoficistoj ĉiam havas multe da laboro, kaj ili do ne restu pli ol duonan horon, se ili ne havas iun specialan temon por pritrakti.

GRAVA ATENTIGO

Pluraj oficistoj de la Centra Oficejo mankos dum la fino de julio kaj unua duono de aŭgusto pro la Universala Kongreso kaj pro libertempoj. Pro tio bv. prefere ne skribi al la Centra Oficejo dum la menciita periodo.

NOVAJ DELEGITOJ

Britujo

Denton. FD (Edukado): la FD (Rotario).

Ĉeĥoslovakujo

Borová u Poličky (Čechy) 9000. D: František Roušar, fervojisto, Borová u Poličky 115, okr. Svitavy; tel. Borová 38.

Žilina (Slovensko) 40 000. VD & FD (Abelbredado): Ladislav Hanzel, ministro, L.B. 1., Hliný-IV.; tel. 30842.

Danlando

Kolding. FD (Statistiko laborborsa) & (Turismo): la FD (Junulargastejoj).

Francujo

Bordeaux. D: la FD (Tendumado).

Rouen. FD (Fervojo): André Loisel, fervoja oficisto, 59 Cours Clémenceau.

Hungarujo

Budapest. FD (Naturscienco): Gábor Farkas, studento, Budapest, XIV. Emilia u. 23; tel. 630-276.

Italujo

Trieste. JD: F-ino Edvige Tantin, bank-oficistino, Via Cappello 7/3; tel. 67615.

Kongo

Kinshasa. FD (Turismo): Alphonse Tshibala, oficisto, 242, Kasongo-Lunda, St. Jean; B.P. 2697 Banque Nationale.

Nederlando

Utrecht. D: la FD (Filmarto).

Norvegujo

Holter (Nannestad). D: Synnöve Kloumann, dommastrino; tel. Nannestad 903.

Nov-Zelando

Auckland. FD (Maristaj aferoj): Victor Granger, oficisto de haven-aŭtoritato, 5 Hayman Street, Birkdale; tel. 284936 hejme; 33200 oficejo (petu 741).

NE PLU VALIDAS

Francujo. Mérignac: D. Nancy: D & FD (Fervojo). Selestat: D.

Hispanujo. Mataporquera: D.

Jugoslavio. Beograd: FD (Sporto)

Nederlando. Haarlem: D & FD (Trafiko).

Usono. Seattle: FD.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Aderjan, f-ino Ch., 673 Neustadt, Germanujo.

Alexandre Gaya, s-ro Joaquín, Hispanujo.

Black, s-ino M. C., Edinburgh, Britujo.

Hedges, s-ro Edwin, Stillwater, Usono.

Svensson, s-ro Lennart, Ljungby, Svedujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1967

257 Bleisher, s-ino Fanny, 258 Pereira, s-ro Evaristo M., 259 Silva, s-ro Paulo Vieira da, Brazilo. 260 Hölscher, s-ro Erich, 261 Klünder, s-ro W., 262 Michalik, s-ino Frieda, 263 Oeste, s-ro W. T., Germanujo. 264 Waksman, s-ino Henia, Israelo. 265 Bugge-Paulsen, kapt. R., Norvegujo. 266 Donovan, s-ro Walter J., 267 Gemmel, s-ino S., 268 Moore, s-ro V. R., Nov-Zelando. 269 Andersson, s-ro Ivar, 270 Andersson, s-ro Sven, 271 Andreasson, s-ro B., 272 Asplund, f-ino Nannie, 273 Carrfors-Edwards-son, s-ino S., 274 Eriksson, s-ro Axel, 275 Hedaeus-Eriksson, s-ino M., 276 Johansson, f-ino E., 277 Silard, s-ro Szabad, Svedujo. 278 Chobanoff, d-ro Stefan, 279 Correa, s-ro Alfonso, 280 Solzbacher, d-ro William, Usono.

DONACOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)

Francujo: Brunet, s-ro Ch., 36,69. Germanujo: Renner, s-ro M., 1,80; Wagner, s-ro H., 25,—. Nederlando: Kleywegt, s-ro C., 25,—.

FONDAJO CANUTO

Germanujo: Wilke, s-ino H., 1 MA. Jugoslavio: Majcenović, s-ro M., 1 J-MJ. Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 4 MA.

Ĉiu kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto omaĝe al la prezidinto de UEA, prof. d-ro Giorgio Canuto. En tiu ĉi jaro la Fondaĵo estas uzata ĉefe por pagi kotizojn de sindonaj novaj esperantistoj en Azio kaj Afriko.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino, C.O.

52-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

(Tel Aviv) Rotterdam, 2-9 Aŭg. 1967

lastaj informoj

OFICIALA KOMUNIKO N. 7

Aliĝado. Rotterdam, 15.6.1967

La limdato por aliĝo estas prokrastita ĝis la 15-a de julio 1967. Oni povas uzi la flavajn aliĝilojn de Tel Aviv aŭ samformatan paperon. Por la kotizoj validas la tarifo de la dua periodo: 77,— gld. por nemembroj, 57,— gld. por MA de UEA. Rapida aliĝo estas granda helpo por la organizantoj.

Loĝado.

Oni mendu loĝejon kiel eble plej baldaŭ. Nun la Loĝiga Servo disponas ankoraŭ pri nombro da litoj, sed ne eblas konservi ilin longe. La prezoj varias de 9,— gld. (turista klaso) ĝis 45,— gld. (luksa). Mendojn faritajn por Tel Aviv oni tuj konfirmu por Rotterdam. Bonvolu precize indiki la datojn de alveno kaj foriro.

Plej insiste ni atentigas, ke neatenditaj alvenantoj sen rezervita loĝejo absolute ne povos trovi lokon kaj ili povos nur endanĝerigi la bonan organizon de la Kongreso. Ni fidus je ĉies komprenemo tiurilate! Kampadistoj, kiuj veturas per propra loĝveturilo aŭ havas propran tendon, praktike ĉiam povos trovi lokon sur la vasta, tre konata roterdama "Camping", Kanaalweg 84, tel. 285499. Distanco ĝis la kongresejo: 10 minutoj aŭtomobile. Je dispono estas tie ankaŭ tre limigita nombro da duperpersonaj kabanetoj, kiuj kostas 5,— gld. nokte. Oni devas aparte lui aŭ kunporti litotukojn. La kabanetojn oni devas tuj mem rekte mendi skribe aŭ telefone.

Ekskursoj.

Du samtempaj tultagaj ekskursoj okazos je lundo, la 7-a: A — Aŭtobusa ekskurso tra la konstruata regiono "Europoort" kun surealismaj pejzaĝoj; tra la plej longa ponto de Eŭropo super Orientskelo al la antikvaj kaj modernaj allogaĵoj de la fama eksinsulara provinco Zelando, kie la insuloj, pro novaj ligoj, ĉesis fakte esti insuloj; kun la ebleco ĝui belajn regionajn kostumojn. Lunĉo okazos en bele situanta restoracio de pitoreska urbeto. Reveno al Rotterdam ĉ. la 18a horo. Prezo, ĉion inkluzive: 32,— gld. Tuj aliĝo nepre konsilinda!

B — Sipekskurso tra la vasta rivero kaj havenaro kaj tra malnovaj riverbranĉoj en orienta direkto. Romantikaj kaj modernaj pejzaĝoj. Vizito al la kastelo Loevestein — situanta ĉe la kunfluejo de du riverbranĉoj — de kie iam la fama juristo Hugo de Groot (Grotius) eskapis en librokesto. Lunĉo okazos surŝipe. Reveno al Rotterdam ĉ. la 18a horo. Prezo: 32,— gld., ĉion inkluzive. Pro la limigita nombro de lokoj je dispono, tuj mendo estas konsilinda.

C — Ĉiutaga ekskurso tra Rotterdam kaj ĉirkaŭaĵoj. Vizito al ĉiuj vidindaĵoj. Okazos je ĵaŭdo, vendredo, sabato, dimanĉo kaj mardo. Prezo: 12,— gld.

Postkongresaj aranĝoj.

D — Septaga aŭtobusa ekskurso tra tuta Nederlando. Ĝi ne povas iri, kiel unue anoncote, tra Benelukso, ĉar en Nederlando mem jam tro abundas pitoreskaj, interesaj kaj nekornataj lokoj. Oni vizitos la Delfenarion en Harderwijk; oni vidos la nove kreitan libertemp-regionon de "Veluwemeer", lago estiĝinta pro nova tero, kie antaŭe estis maro; en fama kanalvilaĝo Giethoorn oni veturos en tipaj prametoj; en la arbarriĉa provinco Drento oni vizitos dolmenojn; oni povos admiri la lagoregionon de Frislando kun folkloreca patkuklunĉo kaj vizitoj al farmbieno; trans la fama Fermdigo, kiu transformis maron en lagon, oni alvenos al la okcidentaj kaj sudaj provincoj kun vizitoj ne nur al Amsterdam, sed ankaŭ al la nova, ekzotika ekspoziciejo "Evoluono" de Philips en Eindhoven; la arĝentista urbeto Schoonhoven kaj la antikvaj konstruaĵoj de Gouda; tipaj vilaĝoj en Brabant kaj kasteloj en Utreĥt memorigos pri pli romantikaj tempoj. Ĉiutage oni alvenos antaŭ la vespermanĝo al la loko de tranoktado, kaj la vesperoj estos liberaj. Forveturo el Rotterdam ĵaŭdon la 10-an de aŭgusto matene. Reveno al Rotterdam merkredon la 16-an de aŭg. ĉ. la 18a horo. Prezo por sep tagoj, inkl. hotelojn, ĉiujn manĝojn, enirbiletojn, veturojn ktp.: 350,— gld. Oni anoncu sin kiel eble plej baldaŭ, ĉar la lokoj estas limigitaj. Nur kun granda peno estis eble rezervi bonajn hotelojn en la diversaj lokoj survoje. Necesas agi rapide! Pluraj personoj jam antaŭpagis 150,— gld. La plenan sumon oni bonvolu pagi nepre antaŭ la 15-a de julio 1967.

E — Dua postkongresa aranĝo okazos en la bela restadejo "Pietersberg" en Oosterbeek apud Arnhem. Ĉarma naturo en proksimeco de arbaroj, kamparoj, erikejoj kaj rivero. Kvartaga trankvila restado, promenoj, allogaj duontagaj ekskursoj en ĉirkaŭaĵoj kiel "Hoge Veluwe", grandega parko kun Van-Gogh-muzeo, "Evoluono" en Eindhoven, ktp. Prezo, inkluz. tranoktadon, ĉiujn manĝojn (4 tagojn), ekskursojn, ktp.: 160,— gld. Oni anoncu kaj pagu kiel eble plej baldaŭ! Kelkaj personoj jam antaŭpagis 150,— gld. La aranĝo okazos de la 9-a ĝis la 13-a de aŭg. vespere.

Kongresa Libro.

Pro la gravaj okazintaĵoj kaj lastmomentaj ŝanĝoj, ne eblas ĉijare sendi la Kongresan Libron antaŭe. Ĉiu kongresano ricevos ĝin en sia kongresa dokumentaro. La kongresejon certe ĉiu facile trovos, ĉar ĝi troviĝas kontraŭ la centra stacidomo. Ĉiu aliĝinto ricevis bildkarton pri ĝi. Enirejo: Kruisplein.

Statistiko (je 14.6.67).

Aliĝis 898 personoj el 34 landoj.

G. G. Pompillo
Konstanta Kongresa Sekretario

esperanto
juli-aŭg. 1967

BAGHY KAJ KALOCSAY!

Elĉerpitaj verkoj akireblaj!

La Libroservo de UEA disponas por vendo malgrandan kvanton de jenaj libroj:

Julio Baghy: LA VAGABONDO KANTAS. Dua eldono, 1937. Poemaro. 104 p., broŝ., 1,50 gld.

Baghy & Kalocsay: ARGENTA DUOPO. Dua volumo, 1937. Antologio. 126 p., broŝ., 3,— gld.

Ne atendu! Mendu tuj!

GEPATRA BULTENO

sub aŭspicio de UEA

Forumo kaj helpilo por gepatroj, kiuj instruas Esperanton al siaj infanoj. Subtenu ankaŭ vi ilian gravegan agadon per via abono! Aperas kvaronjare, bele multobligita kaj ilustrita.

Redaktas Derrick P. Faux. Jarabono: 3,50 gld. (7 ŝil., 14 st.). Peranto: UEA.

ANONCETOJ

Mi estas ege interesita akiri antaŭmilitajn numerojn de "Esperanto" de UEA. Bonvolu skribi al: S-ro R. Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Universala Revuo (Legajoj por ĉiuj) entenas la Adresaron "Esperanto-Parolata", plej utila por parole uzi la interlingvon (Jarlibro, paĝo 126).

Deziras fotojn/memorstampojn de la 1-12, 16, 18, 20, 25, 40, 43, 45a U.E.-kongreso, kolordia-pozitivojn (panoramo) de ĉiuj UE-kongresurboj (Interŝanĝo, aĉeto). Intereso pri Ruĝa Kruco kaj tuta mondlingva movado (Volapük, Esperanto, Ido, Interlingue). E. Anderegg-Gurtner, 9326 Horn am Bodensee Thg., Svislando.

Por sukcesi kaj feliĉadi jen via gvidilo:

"Monoteismo kaj Pozitiva Moralo" de Emil Gasse. Mendu al UEA aŭ ceteraj Libroservoj. Gld. 4,20; st. 16,80 + 10 %.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Prof. Manuel Fernández Menéndez bedaŭras ne povi persone respondi, kaj korsalutas kaj dankas multajn gesamideanojn, kiuj sendis gratulojn pro verko "La homo sur sia vojo".

Lerneja klaso, 14-jaraj geknaboj, lernas ekde januaro. Ŝatus ricevi bildkartojn el la tuta mondo, speciale de samaĝuloj. Instruisto: S-ro Arnold, 8 Munson Cr., Scarborough, Ont., Kanado.



Rigardu la radiojn irantajn de la stelo al la nigraj klavoj. Je ili troviĝas la unuaj taktoj de nia "Espero".

Sub la klavaro estas la komencaj akordoj de la fama Chopin-Polonezo en malnova kaj Muzila sistemoj.

Tiu ilustraĵo estas la ŝlosilo por kompreni la novan notskribon Muzilo.

Montru la bildon al viaj konatoj-muzikistoj. Ili interesiĝos pri Esperanto pere de Muzilo.

Ni sendos Muzilo-eldonaĵon. Skribu al:

**MUZILO, DORDRECHT, FREDERIKSTR. 2,
NEDERLANDO, aŭ:
MUZILO, ZABRZE, SK. PT. 68,
POLUJO**